



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,  
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 196

Aŭgusto 2002

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto  
Stevens Norvell — kompostisto

Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson  
329 Poplar Drive  
Dartmouth, Nova Scotia  
KANADO B2W 4K8  
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:

Reni Porter  
71 RidgeValley Road  
Halifax, Nova Scotia  
KANADO B3P 2E5



Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15

★ ★

## DE ENKONDUKILO ĜIS PEZA VOLUMO

Eble estas tro frue dum feriaj someraj tagoj por pensi pri serioza studado, sed oni ĉiam povas antaŭe prepari la kondiĉojn por bona lernado. Tial *Inter Ni* aperigas du recenzojn pri libroj kiuj multe helpas al tiuj, kiuj deziras plibone lerni nian lingvon.

Povas esti, ke bonaj retlokoj anstataŭos bonajn librojn, sed oni ankoraŭ devas konscii, ke multaj informoj trovitaj en la tuttera tekstaĵo estas malpli fidindaj ol tiuj trovitaj en libroj eldonitaj de fidindaj eldonistoj. Kion vi opinias?

Bonvolu ĝui la recenzojn!

— la redaktoro

## LA NOVA PIV 2002 APERIS

Ĉe la komputilo apud mi kuŝas kvar gravaj, siatempe mejloŝtonaj verkoj. Indas menciiti ilin ĉi tie laŭ la tempa ordo jene: *Vortaro de Esperanto* (Kabe 1911), *Plena Vortaro de Esperanto* (SAT 1934, dua eldono), *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (SAT 1970) kaj *La Nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* (SAT 2002). Pasintaj jaroj kompreneble jam lasis etajn postsignojn sur la unuaj tri, sed la kvara kiel ĵusnaskito brilas ĉiurilate kiel valora juvelo. Nun la ĉefa celo de mia vortara aventuro estas *PIV 2002*, sed eblas al kiu ajn fari komparojn surbaze de la menciitaj libroj.



Facile oni konstatas enorman evoluon kaj en la vivo mem kaj ankaŭ en la lingva medio. La nova formato (150-255 mm) de *PIV 2002* ŝajnas al mi oportuna, ĝi iel estas pli praktika kaj manipulebla ol la unua versio *PIV 1970*. Malgraŭ siaj 1265 paĝoj la gigantulo komforte trovas por si lokon en mia teko. Oni konstatas tuj sur la unuaj paĝoj, ke la verko havas 16780 kapvortojn kaj 46890 leksikajn unuojn. Franca verkisto, Nobelpremiito de 1921 Anatole France (1844-1924), diris: „Vortaro, tio estas la tuta universo laŭ alfabeto ordo.” *PIV* estas certe taŭga helpilo per kiu homoj el diversaj lingvoregionoj povas bone kaj efike interkompreniĝi.

Estis al mi agrabla surprizo rimarki du konceptojn trafe klarigitajn sur la paĝoj de tiu ĉi dua, freŝa eldono: "nifo", kiun mi cetere trovis jam en CEED-vortaro de Peter Benson (Usono, 1995), kaj "samizdato", kies signifon lumigis al mi printempe 2002 en Turku Aleksander Korĵenkov. William Auld recenzis 1969 en *Norda Prismo* la kreaĵon de J.C. Wells *Concise Esperanto and English Dictionary* kaj li esprimis sian ĝojon, ke ankaŭ jam delonge buŝe kaj literature uzataj vortoj estis registritaj. Tamen multaj uzantoj certe gratis tre longe la nukon pro la difino "pudendum muliebre" por piĉo. Tiu latina esprimo estus nuntempe rekomendinda al finnaj knabinoj kaj junulinoj, kiuj tro kuraĝe kaj laŭte publike uzas la vulgaran nacilingvan ekvivalenton. Nun ni ĉiuj povas el *PIV 2002* elekti ĝustajn terminojn - nur unu ekzemplon mi citas: aŭ "midzi" aŭ "frandzi". Necesas substreki, ke la plej prestiĝa unulingva, finna vortaro *Nykysuomen sanakirja* enhavas ankaŭ vulgaraĵojn sen latinlingvaj vualoj. Notindas, ke la komputila mondo ne estas neglektita en la nova *PIV*. Jam tre rapida foliumado donis signifan rezulton: „skani”. Ne estas eble ĉi tie doni pli da spaco al apartaj vortoj.

*PIV 2002* estas presita en Ĉeĥa Respubliko. Pro la bela rezulto oni ŝuldas varman dankon al Petro Chrdle, kiu respondecis pri la afero en Prago. La teksto plaĉas ankaŭ al tiuj, kiuj uzas okulvitrojn. Kompreneble krome al SAT-anoj oni nature kaj volonte etendas la manon por gratuli pro vere kultura atingiĝo komence de nova epoko en 2002. La teksto tiel puras sen eraroj, ke kun rideto oni povas mencii sur la paĝo 445 troveblan vorton „koko”, kiu devas esti „hoko”.

Longe ne cerbumu, sed havigu al vi mem tiun ĉi novan trezoron, kiu apogas ĉiujn seriozajn studantojn de la Internacia Lingvo Esperanto. Kvankam mi kvazaŭ ŝerce elektis iujn vortekzemplojn por ridetigi la leganton, necesas fine akcenti la signifon de bona vortaro per la citaĵo el la pensoj de la jam menciita Anatole France: "Pli bone malmulte kompreni ol malbone kompreni." *PIV 2002* estos via fidinda kaj vojmontra amiko dum multaj jaroj, eĉ jardekoj.

— Jorma Ahomäki  
jorma.ahomaki@pp.inet.fi  
Turku, Finnlando

## RECENZO DE *THE ESPERANTO TEACHER* DE MASON STUTTARD

Kvankam mi estas esperantisto de preskaŭ 25 jaroj, mi ĵus unuafoje gvidis kurson pri la lingvo por angla-lingvaj lernantoj. Por tio mi elektis relative malmulte konatan libron, *The Esperanto Teacher* de Mason Stuttard.



La libro estas relative mallonga (104 paĝoj) kaj tre malmultekosta (\$2,60 ĉe la Libroservo de KEA). Ĝi estis eldonita en 1954 kaj aspektas malnovete, sed ĝi donas solidan enkondukon al la lingvo. Ĝi klarigas ĉiujn bazajn gramatikajn elementojn kaj la plej oftajn afiksojn, kaj instruas ĉirkaŭ 700 vortojn. La libro speciale celas lernantojn kiuj ne antaŭe studis fremdajn lingvojn aŭ gramatikon, kaj ĝi klarigas eĉ la plej bazajn konceptojn, ekzemple kio estas substantivo, kio estas adjektivo, ktp. Laŭ mi, ĝi bone taŭgas por kurso aŭ por memlernado se la lernantoj ne postulas ke la lernolibro havu multe da fotoj kaj belajn desegnaĵojn.

Kiel multaj libroj eldonitaj en Britio, ĝi enhavas kelkajn esprimojn kiuj verŝajne konfuzos Kanadanojn. Estas tute ĝuste klarigi „bonulo” per „good sort”, aŭ „dolĉaĵo” per „a sweet” (p. 36), sed oni ne kutimas diri tiel en Norda Ameriko, kaj kelkaj homoj verŝajne ne komprenos kion oni celas.

Mia ĉefa kritiko rilatas al la vort-listoj en la diversaj ĉapitroj kaj al la vortareto fine de la libro. La vort-listoj ne estas kompletaj, kaj por lerni la lecionojn kaj sukcese fari la ekzercojn oni devas koni vortojn kiuj ne aperas en tiuj listoj. Tial mi preparis kompletan liston de la vortoj uzataj en ĉiuj lecionoj; tiun liston oni povas ricevi de mi. (Vidu la kontakt-informojn sube.)

Krome, la vortareto fine de la libro listigas nur nudajn radikojn kaj ne distingas inter ili kaj kompletaj vortoj (prepozicioj aŭ simile), ekzemple per apostrofo fine de la radikoj. Oni do simple listigas: „kvankam, kvar, kvazaŭ, kviet, kvin”. Tio konfuzos la lernantojn, kiuj ne scios ĉu necesas aldoni finaĵon al "kvankam", ekzemple. Tial mi rekomendas ke la lernantoj ankaŭ havu vortaron, aŭ almenaŭ la senpagajn du-lingvajn vortaretojn haveblajn en la reto, ekzemple tiun de Edmund Grimley-Evans ĉe <<http://www.rano.org/bro-angla>>, aŭ de mi mem ĉe <<http://www.storm.ca/~yan/vortaro.txt>>.



Indas rekomendi tiun ĉi libron, precipe por homoj kiuj ne volas pagi por unu el la pli modernaj lerno-libroj. Kvankam *The Esperanto Teacher* ne havas la amplekson de *Teach Yourself Esperanto* aŭ de *Esperanto: Learning and Using the International Language*, ĝi ankaŭ ne havas ilian koston (respektive 16,50 kaj 19,20 eŭroj ĉe UEA)!

Mi havas la 5an eldonon de 1973; ekzistas ankaŭ la 6a kaj 7a eldonoj, sed ĉiuj eldonoj estas sen-ŝanĝaj represoj de la originalo de 1954.

— Yves Bellefeuille <[yan@storm.ca](mailto:yan@storm.ca)>  
2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4